

Gazeto Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

22-a Jarkolekto * Septembro 2005 * N-ro 79

ISSN 1678-0618



CANENA, belega kastelo kaj
ban-stacio inter oliv-arboj

Gazeto Andaluzia

Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.
Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto**.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto
REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.
IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Ángel ARQUILLOS LÓPEZ
REDACTOR: José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ
(esperanto14@supercable.es)
COLABORADORES: Luis SERRANO PÉREZ, José Antonio VALVERDE
MARTÍN, D-ro Wolfgang GUNTHER, Tonjo del BARRIO, Andrés
MARTÍN GONZÁLEZ.

ENHAVO

11-a Andaluza Kongreso de Esperanto	3
Promenado tra la tradukoj de Don Kihoto	11
Pri Semantiko	16
Andaluza Literaturo <i>La soldato Johano (dua parto)</i>	18
La Ret-Poŝta Listo (esperanto-andaluzio)	21
Paĝoj pri Nia Historio	22
Korespondi Deziras	23
Flamenko.....	24
Poezia Angulo	26
Andaluza Kuirarto	27
Korespondi Deziras	28
Turismi en <i>Canena</i>	29
Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio	32
Kunvenoj, Kongresoj kaj Renkontiĝoj.....	34
Vorta Piramido	35
Lasta Paĝo	36

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.

11-a Andaluza Kongreso de Esperanto

Malago la 8-an kaj 9-an de oktobro 2005

De antaŭ pli ol unu jardeko Malago ne liveris scenejon por la ĝoja rendevuo, en entuziasmaj kunvenoj, de la andaluza familio esperantista, kies periodo koincidis kun iaspeca endormiĝado de la andaluza esperantistaro, se paroli pri renkontiĝoj. Andaluzio, tamen, ne ĉesis logi al rea feliĉa renkonto, en iu el siaj urboj kaj tiel pasintjare Sevilo, kiel inaŭguro de nova etapo, invitis nin al la 10-a Andaluza Kongreso de Esperanto, kies dinamike varia programo dum la daŭro de kompleta semajnfino, donis al la partoprenantoj la impreson vivi realon, kvazaŭ fantazio de plej rava sonĝo, sufiĉa rekompenco por la sepdeko da verdsteluloj, kiuj por kongresi venis eĉ de malproksime suden al Sevilo.



Sed, ĉenero postulas ĉeneron, por garantii la kontinuecon de ĉeno, tial kiam je la fermo de la Kongreso oni petis oferon de ur-

boj por la venontjara Kongreso, Malago fervore respondis al la koncerna voko, akceptante la komision –kiu ja estis vera misio!- organizi la 11an Kongreson.

11-a Andaluza Kongreso de Esperanto Malago, la 8an kaj 9an de oktobro 2005

La Civita Centro, alitempe hospico nomita “Domo de la Miserikordo” kaj nuntempe renovigita kaj adaptita de la Malaga Deputitejo por ĉiaj kultura, arta, politika, sindikata eventoj, estis la sidejo elektita de la organizantoj pro la disponigo de grandaj salonoj, aŭloj kaj la ebleco tranokti en siaj dormoĉambroj.

La sabaton 8an de oktobro, jam je la 9-a horo, fruenintaj volontuloj eklaboras en la pretigo de tiuj tri salonoj kiuj estos ejoj por nia kongreso: en la Arkada Galerio, ĉe la enirejo, LKK-anoj pretigas la akceptejon kien ekde la 10-a horo gekongresanoj prezentos sin por ricevi la kongresdokumentaron (verdan dokumenton kun Kongreslibro, Gazeto Andaluzia, bolkraĵono, surpapera kaj surdiska turismaj broŝuroj pri Malago, la libro “Sanga Nupto” de Federico García Lorca kaj boteleto de malaga dolĉa vino).

Je la dekstra flanko de ĉi tiu Galerio, s-ano Pedro Sanz, alveninta el Madrido por organizi, nome de SATEH, la oficialan Libroservon dum la kongreso, laboras kun la helpo de aliaj membroj de SATEH kiel Pablo Foche kaj David Rodríguez por ke la libroservo estu vizitebla ĝustatempe.



Libroservo aranĝita de Pedro Sanz dum la Kongreso.

Je la maldekstra flanko, fronte al la libroservo, s-ano Cao Xionglin, prezidanto de Nanchang-a Esperanto-Asocio, disponigas sur kelkajn tablojn sian vastan kolekton de esperantaj filatelaĵoj, per kiu, laŭdire, li gajnis arĝentan medalon ĉe Ĉina Kongreso.

Baldaŭ alestis pliaj kunlaborantoj kiuj tra neobstruktita koridoro de la Arkada Galerio aliras al la salono Benamargosa kie ili komencas elpreni librojn el la kunportitaj skatoloj kaj metas ilin ordigitaj sur la tablojn, kio estos la Ekspozicio de nia biblioteko konsistanta el pli ol 400 libroj.

Samtempe, junaj malagaj samideanoj preparas la salonon Canillas de Algaida, pendigas la kongresafiŝon kaj flagojn, ordigas la meblaron kaj prizorgas la aŭvid-aparatojn.

Oni laboras kun nervoj streĉaj; en la koridoro francino Sylvié Roques kunordigas kun la ceteraj naŭ legontoj, la lastajn detalojn pri la legado de Don Kiĉoto.

Estas la deka horo, la ĝusta momento, do, por distribuo de la dokumentaro. Aliĝon kaj sekve ĉeeston ni ricevis el Britio, Francio, Germanio, Italio, Norvegio, Nederlando, Svisio, Bulgario, Hungario kaj kompreneble, Hispanio.

La salonoj por libroservo kaj ekspozicioj brilas pro plenpleno da samideanoj, kiu, side aŭ stare, atestas pri fizika ekzisto de la esperantista popolo. Malnovaj kaj novaj amikoj tie rendevuas. Tie regas la natura moviĝemo de ĉiuj ĝuste venintaj kongresanoj, kiuj ĝojbrue sin intersalutas aŭ stare babilas, ĉar tio ebligas utilajn personajn kontaktojn kun amikoj kaj samideanoj el plej diversaj urboj/landoj. Kvankam ne estas ankoraŭ la 12-a horo, ĉio atestas ke la kongreso komenciĝis, almenaŭ en la neelĉerpebla programero de rekomendinda Zamenhofado, t.e. parole praktiki ĉiukaze la lingvon.

Je la 11:55 iu, kies nomon mi ne povas memori, laŭte ekkriis: kvin por la dekdua! Kongresanoj, ankoraŭ pritraktante detaletojn aŭ skizante ideojn, pogrube forlasas la salonojn kaj sin direktas al la Aŭlo Canillas de Algaida.

La 12-a horo, en aŭlo de la Civita Centro sidas nia diligenta kolegaro. Estraranoj okupas la prezidajn fotelojn, en la podio, malantaŭ tablego, æ unu el kies ekstremoj mi deŝoras (nu, mi intencis) kiel informanto.

Angel Arquillos, prezidanto de AEU (Andaluzia Esperanto-Unuiĝo), malfermas la kongreson, laŭtlegas salutmesaĝon de Augusto Casquero, prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, skizas la movadon en Andaluzio kaj per spritaj vortoj akcentas



Angel Arquillos, Prezidanto de AEU malfermas la Kongreson

nian persiston por ĉiujare renkontiĝi. El sia parolado menciidas la memoro al la plej veterana esperantisto de Andaluzio, s-ano Alfonso Escamilla Roa, 93-jara el Linares (Jaeno), esperantisto ekde 1931, pro lia multjara instruado kaj diskonigado de nia lingvo.

Sekvas salutvortoj de Francisco Javier Martín, prezidanto de Malaga Esperanto-Asocio, kiu bonvenigas la kongresanojn kaj en iliaj nomoj dankas la

lokajn aŭtoritatojn pro la donacitaj materialoj por la kongreso. Laŭ invito de la prezidanto de AEU, sekvas salutado de la ĉeestantoj mem; unu post la alia, seninterrope, venas en la tribunon delegitoj de andaluzaj urboj kaj vilaĝoj, dezirante sukceson kaj fruktodonan kongreson, per frazoj kiel “*mi esperas ke la klopodoj de la organizantoj floris kaj fruktis en sukcesa rezultado*”.

Finiĝis la solena parto kaj venis vico, en bona ordo, por alia ne malpli ceremonia: nia omaĝo memore al Don Kiĵoto. Vi, kara leganto, certe scias ke ĉijare oni festas en Hispanio la kvaran centjariĝon de la unua eldono de la fama verko de Miguel de Cervantes “La Inĝenia Hidalgo Don Quijote de la Mancha”. Ĉar la traduko kaj eldono de tiu verko en esperanto datiĝas de 1977, nia andaluza asocio AEU aliĝis ekde la komenco de la nuna jaro al diversaj aktoj organizitaj de la Delegitejo pri Edukado en Malago kaj tiamaniere ni partoprenis en



Publika legado de Don Kiĵoto en esperanto fare de 10 alilanduloj.

Diversaj lernejoj / gimnazioj per la legado de iu ĉapitro en esperanto. Samtempe ni informis la aŭtoritatojn pri Edukado ke ĉefa akto en nia andaluza kongreso estu la legado de ĉapitroj fare de 10 alilanduloj.

Kaj jen do, la 8an de oktobro 2005 je la 12:30-a horo posttagmeze, Julio Herrero prezentas la legantojn kiuj faros la publikan legadon en esperanto, de la du unuaj ĉapitroj de la menciita verko:

- Perla Martinelli
- Anna Lászay
- Diego Fiumarella
- John Gobourne
- Cao Xionglin
- Ljubomir Trifončovski
- Sylvie Roques
- Eduardo Pérez
- Cyril Rooke
- Joan Inglada

kiuj vere ne legis, sed deklamis, kun sento, ĉirkaŭita orname de desegnoj kaj bildoj pri Don Kiĵoto fare de geinfanoj el plej diversaj

landoj kaj ekspoziciitaj dum nia kongreso dank' al la pruntedono de HEF.

Kiel kompenso, ĉiu leginto ricevis en tiu ĉi akto po unu ekzempleron de "La Inĝenia Hidalgo Don Quijote de la Mancha". Al tiu akto sekvis alia, temanta ankoraŭ pri la omaĝo al Don Kiĵoto. La prelego de Prof. Giorgio Silfer "Don Quijote en ne-hindoeŭropa lingvo: la hungara traduko". Tre interesa temo kies tekston ni intencas publikigi en nia retpaĝo por kono de la neĉeestintoj.

Ni deziras daŭrigi la kongresprogramon kiel eble plej akurate, tamen, ĉar jam la dua vespere, endas disiĝo por tagmanĝo kaj forlasante la Civitan Centron ni ĉiuj promenas al "La Promeneto" (*El Paseito* tiel nomiĝas la restoracio) kie komuna tagmanĝo deturnas niajn pensojn for de seriozaj konsideroj; nun distro anstataŭas laboron, kiel meritita kompenso.

Vespere, je la 5-a horo, ni rekunsidas en la aŭlo Canillas de Algaida kie, laŭ la programo, komencis debato pri "Esperanto en aliaj landoj" profitante la okazon ke nian kongreson ĉeestis 22 nehispanaj geesperantistoj,; do bona ŝanco por skizi la movadon en aliaj landoj

efe eŭropaj. S-ano Cao Xionglin, nome de Nanchang-a Esperanto-Asocio donacis al ni belegan libron "Renkontiĝo en Pekino, Memore al la 89-a Universala Kongreso de Esperanto" kaj albumon kun poŝtkarto kaj poŝtmarkoj eldonitaj okaze de tiu UK en Pekino en la jaro 2004. La intervenoj de s-ano Roland Platteau, el Francio, kaj tiu de nia malaga s-ano Antonio Fabián, ne povis esti finprelegitaj pro manko da tempo; tamen pro ĉia intereso,



Prof. Giorgio Silfer
prelegas pri la hungar-lingva
traduko de Don Kiĵoto

la teksto aperos en nia retpaĝo esperanto-andalucia kaj en la revuo *Gazeto Andaluzia*.

C-ano Ljubomir Trifonchovski, el Bulgario, magistro pri filologio kaj teatra arto, verkisto de originalaj libroj en esperanto ("Manuskriptoj por

bruligo” kaj “Balado pri la Luno kaj la Cervo”), aŭtoro de originalaj teatraĵoj en esperanto (“Scenaro por ombroteatro” kaj “Du kokidoj kvereladis”) pri “Pupteatro kaj Esperanto” kies temo estis tre bone prezentita pere de la projekcio de 20 diapozitivoj.

Ĉar la vespermanĝoro estas tre proksima oni decidis prokrasti la debaton en la aŭlo pri “Esperanto en Andaluzio” kiu estus reprenota je nia reveno el la restoracio. Tamen, apudaj sidlokoj de andaluzoj ĉe la restoracio kaj plaĉa kuniro dum libera nokto estis oportunaj ŝancoj por pritrakti diversajn temojn, cele al posta oficiala renkontiĝo. Freŝa venteto de la strato ventolas la kapojn kaj donas okazon al ni por samideana interbabilo. Ni konkludas ke la plimulto deziras daŭrigi la okazigon de andaluzaj kongresoj, se iu estas preta ŝarĝi sin per tia respondeco (kiam mi finas ĉi raporton ni sciiĝis ke tre eble Onubo organizos la 12an kongreson), tamen kun atendinda kresko de la kongresanaro, ĉefe andaluzaj. Por pli taŭga funkciado de nia regiona organizo, oni esprimas deziron plivigli la Grupojn kaj fondi novajn; kaj por tion atingi nepras ankoraŭ plusubteni, kiel disvastigilon, nian retpaĝon kiun tiel trafe kondukas s-ano Pablo Foche. El inter kompetentaj samideanoj oni esprimas opiniojn favorajn al s-ano José María Rodríguez (Ĉema), de Kordovo, kies helpo kaj sindonemo ebligas la eldonon de “Gazeto Andaluzia” kaj tre faciligis la kongresmaterialon de la nuna kaj pasinta Kongresoj. Oni ankaŭ mencias la neceson starigi ĉeestantan kurson de esperanto en kiel eble plej da urboj (kiam mi skribas ĉi tiujn liniojn, Jaeno, Malago, Onubo kaj Sevilo jam anoncis en la retpaĝo siajn kursojn).

Vesper-manĝo kaj Nokto-manĝo.
Sendube bonegaj momentoj por praktiki
esperanton en agrabla etoso.



Tuj post la noktomanĝo ĉe la restoracio, plejparto el la kongresanaro revenis al la Civita Centro kaj, denove en la aŭlo Canillas de Algaida, la fama hungara kantistino Anjo Amika (esperanta kromnomo de Anna Lászay), prezentis kaj kantis por ni bukedon de popolaj kaj religiaj kantoj entenataj en du el siaj albumoj “Bela Revo” kaj “Dimanĉa Koncerto”.

Je la 00:40-a horo, jam dimanĉe, finiĝis la festo kaj diseriĝis la amaso, serĉe al ripozo kaj dormo.

Dimanĉon 9-an de oktobro, pro la fakto ke, laŭ nova ĉijara interna regularo, la Civita Centro restas fermita dimanĉe, la unusola programero por hodiaŭ estas “Vizito al la Urbo”. Ekde la 10-a matene, per busoj, taksioj aŭ privataj aŭtoj, la gekonkresanoj estas transportitaj al la urbocentro kaj renkontiĝas ĉe la ĉefa enirejo al la Haveno kie invito de iu Urbokonsilanto atendas nin: turisma duetaĝa buso por rondiri Malagon dum unu horo kaj duono vizitante la kastelon Gibralfaro kaj aliajn vidindaĵojn.

Kiam la unua 20persona grupo ekiris per tiu buso (oni devis fari 3 grupojn por maksimume 20 personoj) mi ekpiediris kun la grupo de andaluzoj al La Alkazabo, la araba citadelo-palaco. Angel Arquillos, tradukinto de la informbroŝuro kaj sinoferinto kiel gvidanto, troviĝis surbuse kun la unua grupo, tamen la profesia kapablo kaj samideana helpemo de la jaenano Jordi Lietor, nia tiea



Partoprenantoj en la 11-a Andaluza Kongreso de Esperanto eniras en la Civitan Centron de Malago.

gvidanto, ebligis kontentigan traviziton, tra labirinto de ĉambroj kaj altanoj, nur ligitaj inter si per koridoroj aŭ zigzagaj vojetoj en deklivo, borderitaj de plankoj. En alta teraso, sub speco de pendanta ĝardeno kun fruktoarboj kaj fontanetoj, ni frontis al fotografiloj por eternigi la momenton (mi petas la fotintojn sendu fotojn por aperigi ilin en la revuo).

Pro diversaj grupoj disigitaj tra la vizitoj al la urbo, ĉu piede aŭ buse, kaj frueliro de andaluzoj trajne/buse al siaj urboj, ni ne okazigis komunan tagmanĝon ĉi-okaze, do post nia vizito al La Alkazabo kaj ĉar oportuna horaro estas ni, andaluzoj, iris al restoracio proksima al la bus/trajnstacidomoj kie kunsidas refoje ĉirkaŭ tabloj nia diligenta kolegaro, kiu en laboro paca ne laciĝas... Ĉu ne estas ja paca laboro kunmanĝi?

Ne vizititaj ĉi-okaze sed vizitindaj venontokaze restas la strato kaj la trapasejo "Esperanto", kaj la Muzeo Gasteo La Venko, pri kiu haveblas informbroŝuro en esperanto.

Konsciaj pri la fakto, ke ĉio kio komenciĝas, nepre finiĝos, mi akompanis la onubanojn kaj sevilanojn al la stacidomo. Amikaj manpremoj, ĉe la adiaŭo, sigelis la estimon, kiun dutaga restado kreis inter ni.

Raportis: Julio HERRERO



Promenado tra la tradukoj de Don Kiĥoto



jose maría rodríguez

Kiam en la jaro 1615 aperas la dua parto de “La Inĝenia Hidalgo Kiĥoto de la Manĉo” jam estis publikigitaj la tradukoj de la Unua parto en la lingvoj angla, en 1612, kaj en la franca, en 1614. Eble pro tio Cervantes skribis pere de eldiraĵo de la bakalaŭro

Sanson Carrasco ke *mi kredas, ke ne ekzistos regno, en kies lingvon oni ne tradukos ĉin*. . Sed la aŭtoro mem, en sia kredo ke la tuta mondo konos la rakonton de la hidalgo, humore skribas en la Dediĉo al la Grafo de Lemos ĉe la dua parto de la verkaĵo ke la Imperiestro de Ĉinio sendis al li heroldon petegante akcepti la regadon de la lernejo kie oni instruos la kastilian lingvon en Ĉinio, kies ĉefa libro-metodo estos la aventuroj de Don Kiĥoto, ĉar eĉ ĉinien venis la kono de tiu libro. . Kompreneble temas pri cervanteska tuŝo de humoro, sed evidentas la sukceso de la unua parto de la libro en Hispanio kaj en la apudaj regnoj, kaj tio ŝuldiĝas ne nur al la allogeco de la kiĥoteskaj roluloj kaj aventuroj sed ankaŭ al la fakto ke Hispanio regis Eŭropon politike kaj kulture.

Kiel dirite la unua traduko de Don Kiĥoto oni realigas en la anglan lingvon en la jaro 1612 fare de Thomas Shelton, irlanda katoliko ekziliita en Bruselo kie li tradukis kaj eldonis *The History of the Valorous and Wittie Knight-Errant, Don Quixote of the Mancha*. Verŝajne estis tiel granda la intereso de Shelton rilate la cervantesan verkaĵon, ke li eĉ tradukis kaj eldonis la duan parton jam en la jaro 1616, tio estas nur unu jaro post la apero en Madrido de la originalaĵo.

La unua traduko en la francan lingvon aperas en la jaro 1614, tiujare Cesar Oudin publikigas la unuan parton kaj François de Rosset tradukas la duan parton en la jaro 1618. Estas tre gravaj la tradukoj en la francan lingvon de la libro de Cervantes, ĉar post unu jarcento Francio regis kulture la tutan Eŭropon, tio provokis ke multaj el la tradukoj plenumitaj dum la postaj jaroj baziøis sur la franca teksto kaj ne sur la hispana.

Estas necese elstari la tradukon de Filleau de Saint Martin, kvankam ofte lia traduko estis tro libera, ĉi tiel li adaptas la hispanajn sentencojn kaj eldiraĵojn, kiuj abundas en la verkaĵo, por esti komprenata de franco, kaj se oni faras novan tradukon de tiu teksto en alian lingvon povas okazi ke la plejmulto el la sentencoj diritaj de Sancho estas tute ne-kompreneblaj post du tradukoj. Same Filleau demetas la du lastajn ĉapitrojn de la verko, tiel en tiu traduko Alonso Quijano ne mortas, tio ebligis la eldonon de tria parto de la libro en Francio en la jaro 1695, kies aŭtoro sendube estas la tradukisto mem.

En la italan lingvon Don Kiĥoto estas tradukita la unua parto en la jaro 1622 fare de la profesoro Lorenzo Franciosini kiu ankaŭ tradukis la duan parton en 1625.



Antikva traduko de Don Kiĥoto en la angla lingvo

Rilate la germanan lingvon estas necese elstari du epokojn en la tradukado de la verko de Cervantes. Unuamomente la germanaj tradukoj publikigitaj en Bazelo en la jaro 1682 kaj en Lepsiko en 1734. Ambaŭ temas pri ne-rektaj tradukoj bazitaj sur la franca *Quixot* de Filleau de Saint Martin. Sed sendube la plej grava epoko en Germanio por la hidalgo Don Kiĥoto okazas dum la romantika periodo. Tiam Don Kiĥoto estas tre bone akceptita, oni forgesas la humoran kaj satiran karakteron de la ĉefrolulo kaj oni elstaras la idealismon de la kavaliro luktanta kontraŭ maljustan mondon, kiel skribas Edward Demboski Don Kiĥoto estas *la simbolo de la lukto de la idealo kontraŭ la malagrablan realecon de la ĉirkaŭanta mondo*.

Ĉi-sence oni devas elstari la tradukon realigita de la poeto Ludwig Tied, naskiĝas tiam la romantika vizio de la rolulo kiu poste estus la inspiro de multaj aliaj aŭtoroj.

Sendube la romantika karaktero de la ĉefrolulo helpis la enirigon de Don Kiĥoto en tiujn landojn kiuj dum la 19-a jarcento luktis por atingi sian politikan kaj kulturan sendependiĝon, tiel oni tradukas la verkon en lingvojn kun malmultaj parolantoj kaj minacitaj en sia propra ekzisto, la traduko de universala libro en tiujn lingvojn estas samtempe depostulo,

jen la kazo de la tradukoj en la finan, norvegan kaj ĉekan lingvojn.

Dum ĉi tiuj jaroj Don Kiĥoto ankaŭ atingas la nordon de Europo, ĉefe dank' al ne-rektaj tradukoj bazitaj sur la franca. Tiel okazas en Svedio en la jaro 1802, kelkaj jaroj poste, en 1819, oni tradukas en la svedan sed ĉi-foje bazita rekte sur la kastilia originalo. Rilate la danan lingvon oni tradukis ĝin rekte el la hispana en la jaro 1777 fare de D. Biehl

Se paroli pri la slavaj landoj Don Kiĥoton oni tradukis en la polan el la franca versio en la jaro 1781. En ĉi tiu lando oni vidis la ĉefrolulon el la humora kaj satira vidpunkto. En Rusio la unua traduko el la franca versio apartenas al Zhukovski kiu konsideris al Alonso Quijano kiel karikaturo rolulo. Tamen tuj oni vidas Don Kiĥoton kiel kuraĝan kaj nobelan heroon, kaj el tiu vidpunkto aperis en Rusio kelkaj libroj kaj aliaj roluloj bazitaj en la kastilia ĉefrolulo. La rusa traduko poste estis la elir-punkto por aliaj tradukoj, ekz. la bulgara versio.

Rilate Amerikon en la jaro 1606 kvanto da ekzempleroj de la ĵus eldonita libro atingas Limon. Dum la postaj jarcentoj la hispanaj presejoj havigas al la tuta kontinento de pliaj ekzempleroj.



Traduko en la japanan lingvon

Nur en la jaro 1833, kiam la kolonioj eksendependiĝas, oni eldonas Don Kiĥoton en Meksiko kaj tri jarojn poste en Usono. En la jaro 1880 aperas en Montevideo la unuaj ekzempleroj de Don Kiĥoto eldonitaj en Sud-Ameriko. Dum ĉi tiuj jaroj la libro ne estas tradukita en indiĝenajn lingvojn, la malgranda kvanto da legantoj en tiuj lingvoj kaj la kultura politiko de la amerikaj registaroj dum tiu epoko ne ebligis la tradukon de Don Kiĥoto en tiujn lingvojn. Tamen, la 4-a jarcento de la publikigo de La Inĝenia Hidalgo estos bona kialo por apero en novembro 2005 de la traduko en la lingvon keĉuan, lingvo parolata de 20 milionoj da personoj ĉefe en Peruo. Kroma valoro de tiu eldono estos la bildoj aperantaj en ĝi, kiuj estos realigitaj de peruaj kamparanoj. Alia projekto estas la eldono de Don Kiĥoto fare de la Bolivia Akademio de la Lingvo Ajmara, parolata nuntempe de 3 milionoj da personoj. Kurioze, oni preparas du versiojn, unu tute fidela al la manĉaj pejzaĝoj, kaj la alia kies aventuroj okazas en Bolivio, speciale pripensita por infanoj kaj gejunuloj.

Ekzistas ankaŭ la projekto, aŭspicita de internaciaj kulturaj organismoj, traduki Don Kihoton en la guaranian lingvon por la paragvaja legantaro.

Rilate la afrikan kontinenton, krom la arab-lingvaj eldonoj publikigitaj en Kairo antaŭ kelkaj jaroj, oni tradukis Don Kihoton en neniun afrikan lingvon. Kaj tio malgraŭ la hispana koloniigo de kelkaj zonoj de la kontinento dum pli ol unu jarcento kaj krom la revivigo de la verkistoj en la lingvoj fanga kaj bubja en Ekvatora Gvineo dum la lastaj jaroj de la hispana koloniigo.



Arab-lingva traduko
de Don Kihoto

Filipinoj estis hispana kolonio ĝis la jaro 1898, sed malgraŭ tio la traduko en la tagalan lingvon ne okazis ĝis la jaro 1999 kaj tio dank'al la helpo de la hispanlingva Instituto Cervantes. En la japana lingvo aperis kelkaj tekstoj en la jaro 1887, sed nur en 1915 aperas la kompleta traduko de Don Kihoto. En tiu jaro ankaŭ aperas la korea versio, temis pri la unua kastili-lingva libro tradukita en la korean lingvon.

La unua ĉina traduko aperas en la jaro 1922 bazita sur anglalingva versio, tamen la propra traduko de la titolo kiel "Biografio de magia kavalireska spadistaĉo" pensigas nin pri la dubinda fideleco de la traduko.

En la jaro 1949 Futung Hua tradukas la unuan parton de la libro, sed ĝi estas apenaŭ disvastigita, kaj rilate la duan parton eĉ la tradukisto mem ne konis ĝian ekziston. La Kultura Revolucio malpermesis la tradukojn de eksterlandaj libroj, sed post la morto de Maŭ Zedong la Ministerio pri Kulturo komisiis al la verkistino Yang Jiang la tradukon de la verko. Oni devas elstari la fakton ke Jian ne konis la hispanan lingvon, kaj tiel ŝi unue devis lerni ĝin nur por traduki Don Kihoton.

La traduko en la ĉinan lingvon aperis en la jaro 1978, la ĉapitro temanta pri la lukto inter Don Kihoto kaj la vent-mueliloj aperis en ĉiuj bazaj lerneĵ-libroj de la lando, kaj tio sendube helpis la konadon de nia heroo. La legado de La Inĝenia Hidalgo estis eĉ deviga por ĉiuj studentoj en Ĉinio.

En Hindujo la brita koloniigo diskonigis la ĉefverkon de Cervantes. Aperis tradukoj en kelkaj lingvoj de tiu lando, kvankam temis nur pri kelkaj ĉapitroj de la libro, tiel oni povis legi Don Kiĥoton en la lingvoj urdua en 1894, guĝarata en 1880, hindustana en 1883 kaj en la bengala. En la jaro 1964 aperas la traduko de la kompleta libro en hindia bazita sur la angla versio kaj en tiu sama jaro en la guĝarata lingvo. Oni devas elstari ankaŭ la agadon favore Don Kiĥoton de Carl Keller, kolektanto de ekzempleroj de la libro kaj apoganto de kelkaj tradukoj en diversajn lingvojn, inter ili en la sanskrita kaj en la tibeta lingvoj.

Laste estas necese paroli pri la tradukoj de Don Kiĥoto en la iberiajn lingvojn. En la portugala lingvo aperis traduko en la jaro 1794. En la kataluna la unua tradukanto estis Jaume Pujol en la jaro 1850, tamen finfine oni ne eldonis la libron. Eduart Tàmaro tradukis la unuan parton de Don Kiĥoto en 1882 kaj en 1891 aperis kompleta versio en la kataluna lingvo fare de Antoni Balbuena. En la eŭska lingvo la tradukon de la unua parto oni eldonis en la jaro 1976 kaj en 1985 tiu de la dua parto. Kurioze la tradukanto de la verkaĵo, la baska pastro Pedro Berrondo, plenumis sian tradukon en la tiel nomata "oldan eŭskan lingvon" (*la sola eŭska lingvo kiun mi konis*, laŭ deklaris Berrondo), poste oni devis adapti tiun tradukon en la *eŭskera batua*-n, hodiaŭ parolata en Eŭskio kaj oficiale agnoskita de la *Euskaltzaindia* aŭ Eŭsk-lingva Akademio.



Katalun-lingva
traduko

Rilate la galegan lingvon Don Kiĥoton oni tradukis en la jaro 1992. Alia kurioza kazo estas tiu de la baleara lingvo, en tiun lingvon José María Casasayas tradukis la verkon de Cervantes, sed neniu eldonejo fidis pri la disvendado de la verko kaj tiel la propra tradukisto eldonis ĝin, sed nur ok ekzemplerojn kiuj estis donacitaj al siaj ok genepoj. Kadre de la agadoj dum la 4-a jarcento la *Academia Valenciana de la Llengua* (Valenci-lingva Akademio) lanĉis la projekton eldoni la tradukon en la valencian lingvon plenumota de la romanisto Vicente Muñoz Puelles.

Pri Semantiko



Andrés Martín González

Semantiko estas scienco studanta la vortojn rigardatajn laŭ ilia signifo, iliajn sencoŝanĝojn kaj la historion de ilia sencevoluo (PIV). La vorton SEMANTIKO estigis M. Bréal en 1897.

- **Struktura Semantiko:** Kiam oni parolas pri la signifo de la vorto ne temas ekskluzive pri la interilato de signifanto kaj signifato sed ankaŭ kiel rezulto de la interrilato de iu konkreta signo kaj alia konkreta signo.
- **Distribua Semantiko:** La signifo de ĉiu lingvistikaj unuaĵoj rilatas kun la respondaj kunteksto kie ili aperas.
- **Generpova Semantiko:** Ekz-e, estas eble ke du frazoj samsignifaj havas ankaŭ malsamajn profundajn strukturojn. (Profunda strukturo= ensemblo de logikaj trajtoj el kies kombinado estiĝas la strukturoj de la surfaco.

Agaj difinoj de la signifo.-

La ideo de signifo.-

Estas du skoloj:

- a) Analiza Tendenco, kiu celas difini la signifon pere de ties esencaj elementoj kaj
- b) Aga Tendenco, studanta la vortojn agantajn kaj valoriganta malpli la signifon ol la kielo de la signifo.

Analizaj difinoj de la signifo.-

La plej fama estas tiu de la “baza triangulo” de Ogden kaj Richards.

Ŝajne, la plimulto de la lingvistoj estas konformaj al la “baza triangulo”. Tamen la teorio estas tre diskutita kaj rifuzita de:

- la Ekskludantoj de la “aĵo” de Ogden kaj Richards;
- Bloomfield kaj aliaj amerikaj strukturistoj ekskludantaj la supran verticon de la triangulo, t.e. la mensa aspekto. Laŭ ili validas nur la dekstra flanko de la triangulo, t.e. la flanko de la “aĵo;
- Sekvantoj de Ferdinand de Saussure.

Tre grava estas tiu de Wittgenstein, aŭtoro de la verko "Philosophical Investigations". La aŭtentikan signifon de la vorto oni trovas observante kion oni faras per ĝi.

La Aga Teorio validas kiel helpo kaj komplemento de la referenco ĉar nur eblas esplori la signifon de la vorto se oni studas ties uzon.

La mezuro de la signifo.-

La eksperimento de la "diferenca semantiko" realigita de OSGOOD, SUCI kaj TANNENBANN per komputiloj interesas. La diferenca semantiko konsistas el iu nombro da niveloj, ĉiu kun sep apartaĵoj kies ekstremoj estas adjektivoj oponentaj.

Ja, per la diferenca semantiko objektiviĝas la situacio de la observanto sed ne tiu de la observado.

Travideblaj kaj opakaj vortoj.-

Estas vortoj tute arbitraj kaj ankaŭ estas vortoj motivitaj. La motivado povas esti fonetika (onomatopeo), morfologia (kunmetoj kaj derivaĵoj) kaj nur semantika (metaforaj esprimoj).

Onomatopeo primara estas la imito de la sono per la sono, ekz-e, SUSURI. En la onomatopeo sekundara la sonoj elvokas movon, ekz-e, BALBUTI. Laŭ BLOOMFIELD, la onomatopeoj elvokas tri specojn de movo: spiraj, disiĝo aŭ rapida movo kaj rampo.

Cetere, notindas, ke la onomatopeoj ne estas samaj en ĉiuj lingvoj. Maurice GRAMMONT diris, ke onomatopeo estas io konvencia.

La propraj nomoj.-

Kriterioj kaj iliaj defendantoj por difini la proprajn nomojn:

- Unikeco (Dionizo de Tracujo)
- Identigo (Stuart Mill)
- Rekta signifo de iu ideo, fronte al signifo de akcesora ideo (Stuart Mill)
- Diferenciga sono (Alan Gardiner)
- Gramatikaj kriterioj: a) ĉeesto aŭ foresto de la artikolo kaj b) ĉeesto aŭ foresto de la nombro.

Laŭ Jespersen, la propraj nomoj nenion signifas izole, tamen kiam ili troviĝas en iu kunteksto ili signifas multe.

ANDALUZA LITERATURO

(tradukita en esperanton)

LA SOLDATO JOHANO

de FERNÁN CABALLERO

trad. J.M.R.H.

(dua parto)

Kiam ili atingis la vinkelon, la skeleto diris:

- Soldato Johano: prenu ŝpaton kaj fosu truon ĉi tie.
- Fosu vi se vi tion deziras –respondis la soldato Johano- mi servis dum 24 jaroj al la reĝo kaj mi nur atingis pecon da pano kaj ses monerojn, mi servos neniun alian mastron kiu eĉ ne tion donos al mi.

La skeleto prenis la ŝpaton, fosis kaj tri tinojn li trovis kaj li diris al la soldato Johano.

- Ĉi tiu tino estas plena de moneroj kiujn vi disdonos al la malriĉuloj; ĉi tiu alia tino estas plena de arĝento, kiun vi uzos por di-servi por la ripozo de mia animo kaj ĉi tiu alia estas plena de oro, kiu estos por vi se vi promesas min agi laŭ mi diris.
- Ne timu –respondis la soldato Johano-; dum 24 jaroj mi sekvis fidele la ordonojn, kaj mi atingis pro tio nur pecon da pano kaj ses monerojn, se via moŝto oferas al mi pli grandan rekompencan mi agados eĉ pli fidele.



La soldato Johano agis laŭ la peto de la skeleto kaj li prenis por si la oron de la tino. Sed la diablo Lucifero furioziĝis ĉar li perdis la animon de la mortinto, pro lia bona agado al la malriĉuloj kaj pro la abundaj preĝoj al li oferitaj, do la diablo pripensis la manieron venĝi al la soldato Johano.

La soldato Johano trankvile estis en sia korto kiam aperis diableto kiu diris:

- Bonan matenon, sinjoro Johano.
- Mi ĝojas vidi vin, kia malbela vi estas! –respondis la soldato Johano- ĉu vi deziras fumi?
- Mi ne fumas, sinjoro Johano

- Ĉu vi deziras trinki ion?
- Mi trinkas nur amoniakon.
- Do, kion vi deziras ? Kial vi venis ?
- Mi deziras vian animon –diris fine la diableto-.

Perfekte –diris la soldato Johano-. Senprobleme mi iros kun vi. Mi servis fidele al la reĝo dum 24 jaroj kaj mi nun ne timos malamiketon kiel vin. La soldato Johano nek timas nek ŝuldas, konsentite? Sed unue bonvolu preni kelkajn grandajn figojn el tiu fig-arbo ĉar mi pensas, ke la vojo estos longa.

La diableto, ĉar frandema, ekmanĝis la figojn dum la soldato Johano prenis sian magian dorso-sakon kaj kiam li vidis la diableton li ekkriis:

- En la dorso-sakon!

La diableto kontraŭ-vole eniris en la dorso-sakon, dume la soldato Johano ekbatis la dorso-sakon ĝis kiam la ostoj de la diabletoj turniĝis en farunon. Kiam la diableto revenis en la inferon Lucifero vidis lin kaj li ekkriegis:

- Malbenata estu la soldato Johano, li pagos por tio! Mi mem iros vidi lin.

La soldato Johano atendis la viziton de Lucifero mem kaj pro tio apude de li restis la magia dorso-sako. Do, kiam aperis la granda diablo la soldato Johano diris:

- Amiko Lucifero, la soldato Johano nek timas nek ŝuldas, ĉu vi scias tion?
- Fanfaronulo! Vi ankaŭ devas scii ke mi portos vin en la inferon tuj –diris Lucifero-.
- Ĉu vi? Ĉu vi prenos la soldaton Johanon? Kia orgojla vi estas! –respondis la soldato Johano-. Mi metos en mian dorso-sakon vin, viajn kornojn kaj vian voston.
- Ne diru stultaĵojn! –kriis la diablo- kaj li montris siajn povajn ungojn.
- En la dorso-sakon ! –ordonis la soldato Johano-.

Kaj kvankam Lucifero luktis kontraŭ tiu magia ordono li eniris en la dorso-sakon. Tiam la soldato Johano ekbatis furioze la dorso-sakon. Kiam liaj brakoj laciĝis li malliberigis la diablon kaj li diris:

- Nun jam estas sufiĉe, sed se vi kuraĝas remeti vin antaŭ miaj okuloj mi, kiu servis fidele al la reĝo dum 24 jaroj kaj atingis nur pecon da pano kaj ses monerojn, elŝiros viajn kornojn, viajn ungojn kaj vian voston kaj ni vidos tiam kiu timas, konsentite ?

Kiam Lucifero revenis en la inferon tute disbatita ĉiuj diabloj blasfemis.

- Kion ni faros post tio? –ĉiuj demandis unuvoĉe.

Lucifero respondis.

- Ordonu al ĉiuj seruristoj meti serurilojn en la pordojn, al la masonistoj ŝtopi ĉiujn bruojn de la infero, ĉar la soldato Johano ne devas eniri ĉi tien.

Kaj tion oni faris. Kiam la soldato Johano sentis jam proksima sian propran morton li prenis sian dorso-sakon kaj li piedvojis en la ĉielon.

Ĉe la pordo li trovis Sanktan Petron kaj la ĉiela pordisto diris:

- Saluton, estu bonvena! Kien vi iras, amiko?
- Nu, mi deziras eniri –respondis la soldato Johano-.
- Haltigu amiko, antaŭ ol eniri en la ĉielon estas necese koni viajn bonajn agadojn. Kion vi faris en la Tero?
- Nenio –respondis la soldato Johano- mi servis dum 24 jaroj al la reĝo kaj mi atingis kiel rekompencan nur pecon da pano kaj ses monerojn. Ĉu sufiĉas?
- Ne sufiĉas –diris Sankta Petro-.
- Ĉu ne sufiĉas ? Ni jam vidos -respondis la soldato Johano- kaj li eniris en la ĉielon



Sankta Petro denove provis halti lin, sed tre rapide la soldato Johano rigardis atente la Ĉiel-Pordiston kaj tuŝante sian dorso-sakon li ekkriis:

- En la dorso-sakon!

Kaj Sankta Petro, kvankam li luktis por eviti eniri en la dorso-sakon, li finfine devis eniri en ĝin, kaj samtempe li ekkriis:

-Liberu min, soldato Johano –kriis Sankta Pedro- pensu, ke la pordoj de la Ĉielo estas tute malfermitaj, kaj sen pordisto ĉi tien povas eniri kiu ajn.

- Tion ĝuste mi volis –diris la soldato Johano kiam li eniris trankvile en la ĉielon- ĉar ĉu via moŝto kredas ke, post 24 jaroj da fidela servo al la reĝo en la tero atingante nur pecon da pano kaj ses monerojn, mi ne meritas eniri en la ĉielon?

LA RET-POŝTA LISTO [esperanto-andaluzio]

* Kio estas retroŝta listo?

Ĝi estas sistemo ebliganta la sendadon de retroŝtaj mesaĝoj al grupo da adresoj pli aŭ malpli granda. La sendanto nur devas sendi la mesaĝon al la adreso de la listo. Tiu mesaĝo estos aŭtomate resendita al ĉiuj membroj de la listo.

* Por kio utilas retroŝta listo?

La ĉefa celo de la retroŝtaj listoj estas la interŝanĝo de informo. Kiam ĉiuj membroj de la listo povas sendi mesaĝojn, la retroŝtaj listoj funkcias kiel debato-forumoj pri la plej diversaj temoj.

* Ĉu ekzistas listo pri esperanto en Andaluzio?

Jes. Al ĝi povas aliĝi ĉiuj homoj dezirantaj tion, ne gravas ĉu ili loĝas aŭ ne en Andaluzio, kvankam estus konvene ke ĉiuj homoj apartenantaj al la andaluza movado kaj uzantaj la reton aliĝu.

* Kiel mi povas aliĝi?

Vizitu nian tt-ejon (<http://www.esperanto-andalucia.org>) kaj klaku sur la butono "Retroŝta listo". Plenumu la aperontan formularon per via retroŝta adreso kaj klaku sur la dekstra butono. Poste vi ricevos mesaĝon petantan vian konfirmon.

Se vi havas dubon skribu nin:

ttt-zorganto@esperanto-andalucia.org

Paĝoj pri Nia Historio

Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio



Angel Arquillos Gómez

Ne ĉiam oni atingas la plezuron paroli kun homoj kiel Alfonso Escamilla Roa, maljuna esperantisto, loĝanta en la urbo Linareso. La 15-an de oktobro, post la neforgesebla Andaluzia Kongreso de Esperanto, sub terura pluvego, mia edzino, samideano Roland Platteau el Francio kaj mi, vojaĝis al la urbo Linareso, kun la celo viziti lin.

En iu loko de la urbo, ni renkontiĝis kun Pablo Foche, (Jaeno) kaj Salvador García, (Linareso), kaj ĉiuj kune alvenis ĉe li. Evidente li kaj liaj gefiloj atendadis nin, kaj plezure invitis nin eniri domon, kie ili pretigis tablon plena je bongustaj kanapoj kaj diversaj trinkaĵoj. Nia kara Alfonso, emociita pro la vizito, klopodis paroli esperante sed finfine, kiel kutime, ni ekkrokodilis, sed tio estis normala ĉar lia familio ne estas esperantistoj kaj ni estas "edukitaj homoj" kaj partoprenigis ĉiujn al la konversacio, kiu temis precipe, pri la pasinta andaluza kongreso, lia sperto pri Esperanto kaj ontaj eventoj. Oni parolis pri la kurso en la popola Universitato de Jaeno, la ebla estonta grupo de Linareso, ktp.

Li montris al ni la belajn pentraĵojn, kiuj ornamas la saloneton de sia alloga domo, ĉar li estas artisto, ne nur pri pentrarto sed pri muziko kaj kiel instruisto, li estas konata en la kvartalo kiel: "El maestro", se oni demandas tie pri "el maestro", ĉiuj najbaroj scias pri kiu temas.

Dum kelkaj jaroj li estis direktoro de la blov-orkestro de la vilaĝo Pegalajar, kie li dum multaj jaroj laboris ankaŭ kiel nacia instruisto. Multaj kaj gravaj temoj estis tuŝitaj kaj nia konversacio nur haltiĝis kaj devas daŭriĝi venontfoje, eble ĉe li eble en iu alia pli granda ejo, ĉar mi esperas ke venontfoje ni kuniĝos pli granda grupo.

Mi devas rimarki ke malgraŭ lia maljuneco, li kapablas uzi komputilon kaj per tiu ilo li skribas kaj interŝanĝas mesaĝojn kun mi kaj aliaj samideanoj. Lia retadreso estas: abudonal92@hotmail.com.



Maldekstre-dekstren: Roland Platteau (Francio); Alfonso Escamilla (Linareso); Pablo Foche (Jaeno); Angel Arquillos (Malago) kaj Salvador García (Linareso).

KORESPONDI DEZIRAS ...

Iris Valdespino Rojas

De Meksiburbo en Meksiko

Virino, naskiĝis en 1983.

Lingvo-nivelo: komencanto.

Profesio: Studento pri konto.

Interesoj: Teniso kaj konto.

Plaæas al mi ludi tenison. Mi studas konton en la Universitato Nacia Aŭtonoma de Meksiko. Interesas al mi korespondi kun



esperantistoj el la tuta mondo por praktiki la Internacian Lingvon, speciale kun esperantistoj kun alta nivelo de Esperanto por plibonigi mian scion de la lingvo. Korespondu kun mi, elkore Iris. **paypetit@yahoo.fr**

Flamenko

Ekstarigis la Muzeo de la Flamenko en Jerezo.-

Antaŭ tri jaroj oni diskonigis la projekton de la Jereza Urbodomo rilate la konstruon de la Urbo de la Flamenka Arto. Ĉi tiu projekto baziĝas ĉefe sur kvar konstruaĵoj: la Muzeo, la Al-Andalusa Eŭropa Centro, la Aŭditorio kaj la Supera Lernejo de Flamenka Arto.

La Andaluzia Registaro kunlaboros kun la Jereza Urbodomo en la konstruo de la Muzeo de la Flamenko kiu ĵus ekkonstruiĝas en la placo Belen, apud la kvartalo Santjago unu el la plej gravaj luliloj de la Flamenka Arto.

Kiel dirite, la aliaj tri partoj de la projekto estas la Al-Andalusa Eŭropa Centro, la Aŭditorio, kie almenaŭ 800 personoj povos renkontiĝi por aŭskulti flamenkajn kantistojn sen la uzo de mikrofono aŭ laŭt-paroliloj kaj la Supera Lernejo de Flamenko, kie oni instruos temojn pri ĉi tiu arto.

Kongreso por studi la figuron de *La Niña de los Peines*.-

Fine de novembro okazis en Sevilo la Kongreso “*La Niña de los Peines* - Heredaĵo de Andaluzio”. Ĉi tiu kongreso estas la rezulto de la demarŝoj de la Kultura Departamento de la Andaluzia Registaro, kiu jam en la jaro 1997, deklaris la ekzistantajn



Pastora Pavón,
La Niña de los Peines

sonorajn registraĵojn de la flamenka kantistino Pastora Pavón “La Niña de los Peines” kiel Kulturano Komunano Altvaloraĵon.

Dum la kongreso oni studis la figuron kaj la kantaĵojn de ĉi tiu sevila kantistino. Pastora Pavón Cruz naskiĝis en Sevilo en la jaro 1890 kaj ŝi mortis ankaŭ en ti andaluzia urbo en la jaro 1969. Ŝia flamenk-arta kromnomo “La Niña de los Peines” naskiĝis el sia unua kantaĵo ...*kombu vin per miaj kombiloj*... ekde tiam ŝi estis konata kiel *la knabino de l’kombiloj*. Jam en la jaro 1921 ŝi kantis ĉe flamenka spektaklo en Madrido kaj en Bilbao partoprenante en preskaŭ ĉiuj gravaj flamenkaj festivaloj dum tiuj jaroj. Post la milito ŝi kantis tra la tuta Hispanio. En 1961 okazis en Kordova flamenka festivalo honore al Pastora Pavón kaj ekde la jaro 1968 ekzistas monumento en Sevilo dediĉita al “La Niña de los Peines”. Laŭdire ŝi estis la plej kompleta kaj grava flamenka kantistino en la 20-a jarcento.

Por kontakti kun la E-asocioj kaj grupoj en Andaluzio uzu la jenajn elektronikajn adresojn:

- * Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
andalucia@esperanto-andalucia.org
- * Malaga Esperanto-Asocio
malaga@esperanto-andalucia.org
- * Sevilja Esperanto-Asocio
sevilla@esperanto-andalucia.org
- * Kordova Esperanto-Asocio
cordoba@esperanto-andalucia.org
- * Onuba Esperanto-Asocio
huelva@esperanto-andalucia.org
- * Jaena Esperanto-Asocio
jaen@esperanto-andalucia.org
- * Esperanto-Klubo Aksarkia
axarquia@esperanto-andalucia.org
- * Granada Esperanto-Grupo
granada@esperanto-andalucia.org

Poezia Angulo

RIMO XXXIV

Ŝi iras en silento kaj sin lulas
en muta, bela ritmo;
harmonion de leĝera himno.

L'okulojn ŝi apertas, la okulojn
kun tage hela brilo,
kaj tero kaj ĉielo sin spegulas
en ŝi per nova lum' en pupiloj.

Ŝi ridas, kaj la plaŭdo de flu-akvo
reeĥas en la rido;
ŝi ploras, kaj poemas ĉiularme
senlima tener-vibro.

Ŝi havas ĉion: lumon kaj parfumon,
koloron kaj linion,
esprimon poezian kun la formo
vekanta la deziron.

Ke ŝi malsaĝas? Ba! Dum lipoferme
ŝi gardos la enigmon,
mi kredas, ke, silenta, ŝi superos
la dirojn de alia ajn virino.

Gustavo Adolfo Bécquer
Sevilo 1836 / Madrido 1870

Esperantigis: Fernando de Diego
en la libro "Kun Sopira Koro" – 1972.



ANDALUZA KUIRARTO

Azalimojea

Jen bongusta almeria salato, kie ankaŭ troviĝas fiŝo: la moruo. Oni devas manĝi la *azalimojea*-n malvarme.

Jen la ingredientoj por 4 personoj:

- 250 gramoj da moruo.
- 2 cepoj.
- 6 ajleroj.
- 2 sekaj ruĝaj kapsikoj.
- 125 gramoj da nigraj olivoj.
- ½ litroj de oliv-oleo.
- Salo.



Jen la farado:

Dum la antaŭa nokto oni trempas la moruon, ni devas sanĝi la akvon almenaŭ du aŭ trifoje. Ni haketas la cepojn kaj en pato kun oliv-oleo ni lante kuiras ĝin, ĝis kiam la cepo estos malmola.

Ni haketas la ajlerojn kaj poste ni rostos ĝin. Friktu la kapsikojn, kiam ili estos malvarmaj pistu ilin.

Tranĉu la moruon laŭ strioj, poste vi devas rosteti ilin .

Ene de salatujo oni miksiĝos ĉiujn ingredientoj, poste ni aldonos la nigrajn oliv-oleojn kaj oni spicos la tutaĵon per oliv-oleon kaj iomete da salo.

BONAN APETITON !

KORESPONDI DEZIRAS ...

**Victoria BENÍTEZ
GUERRERO**

Virino, naskiĝis 1952
komencantino.
Profesio:
Instruistino de la
Angla Lingvo.



Interesoj: koni diversajn kulturojn.


Mia nomo estas Victoria sed vi povas diri al mi Viki. Mi loĝas en Meksikurbo kaj mi estas instruistino de la angla lingvo. Mi opinias ke la homoj estas egalaj kaj pro tio mi ŝatas Esperanton. Mi volas korespondi kun diversaj esperantistoj el la tuta mondo por plibonigi mian scion de Esperanto kaj por koni siajn kulturojn. Meksiko estas riĉa lando kun riĉa kulturo. Mi atendas vian leteron !
Elkore Viki.

vickyviva52@yahoo.com.mx

TURISMI EN ... CANENA

inter Ubedo kaj Linareso troviĝas en la provinco Jaeno la vilaĝo CANENA (esperant-lingve Kaneno). La origino de la vilaĝo troviĝas ĉirkaŭ la termobanejo tie ekzistanta uzata de la romianoj. Sed verdire, la fondiĝo de Kaneno suldiĝas al la araboj, dank' al la alveno en la zono de la tribo *Banu Kinana* kies membroj sidiĝis tie kaj donis la nomon de la tribo al la vilaĝo fondita.

En la jaro 1227 la kastilia reĝo Ferdinando la 3-a konkeris la urbon, samtempe al la najbaraj Ubedo kaj Baezo. Komence de la 16-a jarcento la vilaĝo dividiĝas en du zonoj, unu regata de la ordeno de Santjago kaj la alia sub la ordeno de Kalatravo, la kruco de ambaŭ religi-militaj ordenoj aperas en la nuntempa blazono de Kaneno. Sed en la jaro 1539 la imperiestro Karolo la 1-a unuiĝis ambaŭ zonojn. Ekde tiam, kaj ĝis la mezo de la pasinta jarcento la plejmulto el la ĉirkaŭantaj teroj apartenis al la Markizo de Camarasa.



Blazono de CANENA

Kaneno nuntempe estas malgranda vilaĝo, kun proksimume 2.100 enloĝantoj ĉefe ter-kulturistoj, kie abundas la oliv-arboj kaj la hortoj kaj oni povas aserti, ke ĝi estas unu el la plej allogaj kaj trankvilaj vilaĝoj en la nordo de Andaluzio.



Kastelo de Kaneno

Monumentoj:

Paroli pri la monumenta riĉeco de Kaneno signifas paroli unualoke pri la kastelo. Verdire, ĝi estas unu el la plej belaj kasteloj en Jaeno, kaj en ĉi tiu provinco ja abundas la kasteloj. Konstruis ĝin la araboj en la jaro 1079. En la jaro 1538 la imperiestro Karolo la 1-a vendis la kastelon al sia sekretario Francisco de los Cobos, kiu petis al la prestiĝa arkitekto Andrés de Vandelvira rekonstrui ĝin, interkrampe oni diros, ke Vandelvira inter aliaj monumentoj estis la arkitekto de la jaena katedralo. En la jaro 1931 oni deklaris la kastelon “nacian monumenton”. En 1946 la posedanto decidis vendi ĝin por profiti la konstru-materialojn, ĉar la kastelo apenaŭ estis ruinaĵo. Sed kelkaj personoj en la vilaĝo atingis halti tiun projekton kaj tiel la kastelo estas rekonstruita. Temas pri kvadrata konstruaĵo kun du grandaj cirklo-formaj turoj. Meze de ĝi estas renesanca korto. Oni povas viziti ĝin lunde vespere.



La kastelo de Kaneno
el alia vidpunkto

Kaneno estas vilaĝo riĉa je akvo-fontoj. Estas belaj kaj freŝaj la “Fuente del Caño”, konstruita dum la epoko de Karolo la 1-a; la “Fuente del Arca” kiu provizis per akvo la kastelon kaj la “Fuente del Pilarejo” ĉefe uzita por akvumi la hortojn.



Preĝejo de Sankta Maria

Alia vidindaĵo en Kaneno estas la preĝejo de Sankta Maria. La konstruo de la preĝejo finiĝis en la jaro 1564. La art-stilo estas renesanca, dekstre de la ĉefa enirejo starigas alta turo. Ene de la preĝejo troviĝas ankaŭ malgranda muzeo kaj fidela arkivo kie eblas legi ĉiujn baptajn kaj geedziĝajn okazintajn en Kaneno ekde 1564.

Festoj

Okazas la ĉefaj festoj la 25an de aprilo, honore al Sankta Mateo; la 15an de majo honore al Sankta Izidoro kaj la 15-an de aŭgusto honore al la Virgulino de "Los Remedios". Ĉe la kastelo okazas dum la semajnfinoj de la monato julio muzik-festivalo kaj tie eblas aŭskulti kaj vidi spektaklojn de ĵazo, opero, piano, gitaro, ktp.

Tipaj Manĝaĵoj

Kaneno produktas altkvalitan oliv-oleon. Bongusta estas la rizo kun kuniklo kaj la *cazuela*, kiu konsistas el torto farita kun legomoj, pin-semoj kaj sezamo.

Venonnumere

Turismi en ...

HORNACHUELOS (*Kordovo*)

MISTEROJ KAJ LEGENDOJ DE ANDALUZIO



j.m.r.h.

La rakonto de la fiŝ-viro

La rakontoj pri sirenoj kaj maraj monstroj abundas ĉe zonoj apud la marbordo. Sed ĉi tiu historio, kiun ni rakontos ĉi-numere, estas speciala pro la fakto, ke la diskoniganto estis racia sciencisto de la 18-a jarcento, la pastro Benito Jerónimo Feijoo. Ĉio okazis laŭ jene:



La pastro Benito Jerónimo Feijoo, kiu rakontis en sia libro *Theatro Critico Universal* la historion de la Fiŝ-Viro de Kadizo.

Meze de la 18-a jarcento loĝis en la vilaĝo Liérganes, apud Santandero norde de Hispanio, la geedzoj Francisco de la Vega kaj María de Casar, ili havis kvar filojn. Unu el ili, Francisco, marŝis en Bilbaon por labori kiel ĉarpentisto. Tie loĝis la junulo kiam en la monato junio de la jaro 1674 li iris en la riveron por naĝi kune kun kelkaj amikoj. Francisco naĝis rekte en la maron, sed tio ne ŝajnis problemo ĉar li naĝis lerte. Tamen, post kelkaj horoj, li ne revenis kaj post kelke da tempo oni konsideris lin mortinta pro dono.

Kvin jarojn poste, en 1679, grupo de fiŝkaptistoj en Kadizo, sude de Andaluzio, vidis en la maro strangan figuron, aspekte homa. Kiam la fiŝkaptistoj alproksimiĝis al li, li rapide foriris en la maron. Tiu sama apero okazis kelkajn tagojn poste, sed tiufoje la fiŝkaptistoj altiris lin kun pecoj da pano kaj finfine ili atingis kapti tiun strantan ulon uzante retojn. Kiam tiu stranga besto jam estis en la ŝipo la maristoj vidis, ke reale temis pri forta junulo, kun pala vizaĝo kaj ruĝa hararo, sed kun propraj fizikaj karakteroj ĉar li havis skvamojn el la ĝorgo ĝis la stomako.

La fiŝkaptistoj portis tiun strangan ulon en la monaĥejon de Sankta Francisko, kie la pastroj ekzorcis lin celantaj forpeli la eblajn malignajn spiritojn. La monaĥoj uzis kelkajn lingvojn por alparoli lin sed ili atingis nenian respondon. Post kelkaj tagoj la stranga ulo prononcis vorton "Liérganes", vorto ne-konata en tiu kadiza zono, tamen unu el la monaĥoj naskiĝis en Santandero kaj li asertis, ke temis pri vilaĝo en la nordo de Hispanio. Oni petis informon al la preĝejo de Liérganes por scii ĉu stranga

afero okazis tie rilate junulon. Nenio eksterordinara okazis dum la lastaj jaroj en la vilaĝo, oni respondis, escepte de la subita malapero en Bilbao de la filo de Francisco de la Vega kaj María del Casar.

Kvankam unuavide ambaŭ aferoj, tio estis la malapero de junulo en Bilbao kaj la apero de stranga ulo en Kadizo ne havis rektan rilaton, la pastro Juan Rosendo, monaĥo en la monaĥejo kien oni portis la strangan ulon, deziris viziti Liérganes en Santandero por definitive scii ĉu ambaŭ kazoj, apero kaj malapero, povus havi ian rilaton. Kaj ili kune marŝis norden de Hispanio.

Kiam restis ankoraŭ kelkaj leŭgoj por atingi la vilaĝon la pastro lasis sola sian akompananton kaj li eraris eĉ ne unu solan fojon por atingi la ĝustan vojon en la domon de María del Casar. Kiam ŝi renkontis lin ŝi kriis emocie pro la feliĉeco revidi viva sian perditan filon.

La junulo Francisco restis ĉe ŝia patrino, kie li loĝis trankvile, li ĉiam iris preskaŭ senveste kaj nudpiede. Kiam li manĝis tion faris avide kaj poste li ne manĝis dum kvar aŭ kvin tagoj. Li estis kvieta kaj servema kaj ĉiuj opiniis, ke li estis tute freneza. Post naŭ jaroj li iris denove en la maron kaj li ree malaperis. Tiu estis la lasta informo pri la junulo Francisco, perdita en Bilbao kaj trovita en Kadizo.

Andaluzia Esperanto – Unuiĝo

je la servo de la disvastigo de la internacia lingvo
esperanto en Andaluzio.

Kunlaboru kun ni !!

Kaj ne forgesu, ke ankaŭ ekzistas lokaj esperanto-asocioj
en:

- Sevilo
- Jaeno

- Malago
- Onubo

- Kordovo
- Aksarkio

www.esperanto-andalucia.org


KUNVENOJ, KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ

Zamenhofa Tago en Andaluzio.-

La venontan 17an de decembro, sabaton, je la 14:00 horo okazos kunmanĝado en Antekero (Malago) por festi la Zamenhofan Tagon. Ĝi celas kunigi esperantistojn el la tuta Andaluzio, kvankam kompreneble alilokaj samideanoj estos ege bonvenaj.

Oni jam rezervis lokon en Restoracio *Lozano*, kiu situas ekster la vilaĝo, en industria areo. La Restoracio estas ne multekosta kaj ŝajne bonkvalita pri manĝoj.

Ĉeestontoj devas nepre sin anonci kiel eble plej baldaŭ por scii la konkretan nombron da partoprenantoj. Uzu jenan ret-adreson herzo2(heliko)hotmail.com (heliko = @). Vi indiku se eble per kiu rimedo vi vojaĝos, por scii ĉu estas sufiĉe da aŭtoj kiuj povus translokigi nin ĉiujn al Restoracio.



Situo de la Restoracio Lozano
Zamenhofa Tago en Andaluzio 17an de decembro 2005

VORTA PIRAMIDO

7.-

6.-

5.-

4.-

3.-

2.-

1.-

Difinoj:

1: Akuzative, medikamento, aplikenda sur la tegumentojn.

2: Granda, senvenena azia serpento.

3: Mezono kun maso inter 260-oble kaj 280-oble, ol tiu de elektrono.

4: Arbo.

5: Persona pronomo.

6: Alia persona pronomo.

7: Verba finaĵo.

Memoru ke por trovi la 2-an vorton estos necese demeti literon al la 1-a vorto kaj uzi la ceterajn literojn. Por trovi la 3-an vorton same rilate la 2-an, kaj tiel ĝis la 7-a difino formita nur de unu litero.

Ne forgesu aboni Vian kotizon por la kuranta jaro 2005 (kaj tiun de la jaro 2004 se Vi tion ankoraŭ ne faris). La aliĝ-kotizo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kostas 15 eŭrojn, se Vi jam kotizas en unu el la lokaj andaluzaj kluboj bv. kontakti kun Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Uzu unu el la jenaj banko-kontoj:

- BBVA: 0182 4106 71 0207160717

- Caja General de Ahorros de Granada: 2031 0225 54 0100187657

Bv. post pagi Vian jaran kotizon ne forgesi sciigi al la asocio pri Via pago. Uzu por tiu informo nian adreson en Malago, en Kordovo aŭ nian elektronikan adreson.

La numero 80-a de *Gazeto Andaluzia* aperos fine de la monato decembro. Ĉi tiel dum la kuranta jaro 2005 aperus 4 numeroj de nia revuo. Venontjare la redkacio planas aperigi la revuon 5-foje en la jaro. Multajn Dankojn al ĉiuj kunlaborantoj.

Viajn kontribuaĵojn, opiniojn, sugestojn, kritikojn, kion ajn. bv. sendi al nia adreso:

GAZETO ANDALUZIA, Apartado de Correos 3142, 14080 Córdoba
esperanto1@supercable.es

Vizitu en Interreto la jenajn paĝojn:

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo: www.esperanto-andalucia.org

Kordova Esperanto-Asocio: es.geocities.com/esperantocordoba

Jaena Esperanto-Asocio: www.esperanto-jaen.tk

Sevilja Esperanto-Asocio: www.sevilo.tk

Onuba Esperanto-Asocio: <http://groups.msn.com/EsperantoenOnubo>

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.

Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López
Vic-Prezidanto: Rafael Sepúlveda Bernal
Sekretario: David Rodríguez García
Kasisto: Julio Herrero Segura
Voĉdonanto pri Propagando: José María Rodríguez Hernández

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj: aarquillos@lycos.es
esperanto14@supercable.es

TTT-paĝo: www.esperanto-andalucia.org

Aliaj interesaj adresoj de la Esperanto-Movado

* Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)
uea@inter.nl.net

* Hispana Esperanto-Federacio
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)
admin@esperanto-es.net

